

ESPERANTO

★ TRIUMFONTO ★

Publikigilo de multaj gravaj Esperantistaj organizaĵoj.

Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komercio“ kaj „Revuo“ (literatura, popolscienca).

Protektantoj:

Dr. Leono Zamenhof, Warszawa
W. M. Page, adv., Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gili Noria, komercisto,
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,
București
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bank- kaj fabrik-
direktoro, Kaunas.

N-o 157
16. 9. 1923

Redakcio:

Cefredaktoro: Teo Jung.
Redaktoro: Robert Kreuz.
Redakciaj kunlaborantoj:
Zanol (literaturo)
M. Butin, L. K.

Administracio:

(Preciza poŝtadreso)
Esperanto Triumfonta
Horrem bei Köln, Germanlando.
Tarifo
vidu sur speciala folio, kiu estas aldon-
ata al ĉiu specimeno kaj unua numero
de nova abono.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

Esperanto en la servo de Poŝto kaj Telegrafo.

Ni publikigas hodiaŭ artikolon de fervora propagandisto en tre grava faka sfero. Kvankam ĝi estas skribita jam antaŭ kelka tempo kaj ni pro manko de loko ne povis ĝin aperigi, ĝi estas tiom aktuala, ke la koncernaj interesatoj legos ĝin kun granda utilo.

Dume la grandaj sukcesoj de Esperanto en la lasta jaro kaj speciale en la lastaj monatoj instigis la Internacian Ligon de Esperantistaj Poŝt- kaj Telegraf-Oficistoj (ILEPTO) prepari peticiojn al la Internaciaj Poŝt- kaj Telegraf-Oficejoj en Bern por la enkonduko de Esperanto en la trafikajn sistemojn de la poŝto kaj telegrafo, kolekti ante subskribojn de personoj aprobandaj tiun ĉi proponon.

Ni represas post la ĉefartikolo cirkuleron de ILEPTO rekomendite senditan al ĉiuj delegitoj kaj aliaj Esperantistoj kaj varme rekomendas ĝian atenton al niaj legantoj.

Neniu preterlasu la okazon antaŭenpuŝi Esperanton sur tiu ĉi granda kaj vere internacia labor-kampo.

Redakcio de ET.

* * *

Evoluo de la lingva problemo ĉe la Poŝto, Telegrafo kaj Telefono.

De O. Rieck, poŝtdirektoro, Greifswald.

Estas natura leĝo, ke la interkomunikigo uzas la plej konvenan vortojn. Se ne ekzistas konvenaj naturaj vortoj, la naturforoj, bestoj kaj homoj forigas laŭpove la barilojn, kiuj malhelpas ilin. Akvo-amasoj trarompas montarojn, bestoj traboras lignon aŭ trafosas teron, kaj la homoj konstruas stratojn, kanalojn, tunelojn, fervojojn, veturilojn, ŝipojn, flugmaŝinojn, telegrafajn ktp. Sed por sia komplika interkomunikigo la homoj bezonas ne nur multe da iloj, sed ankaŭ la lingvon. Bedaŭrinde la lingvo jam en pratempo, kiam la interkomunikigo estis sensignifa, tiel diferencigis, ke ni havas nun ĉirkaŭ 860 naciajn lingvojn kun preskaŭ 5000 dialektoj. Komprenable la multlingveco estigis malhelpo al la interpopola interkomunikigo, kaj ni havas antikvajn dokumentojn montrantaj, kiamaniere oni penis superi la malfacilaĵojn. Mi mencias nur la 500 argilajn tavolojn el la 15-a antaŭkrista jarcento, kiujn oni trovis antaŭ 35 jaroj en El Amarna (Egiptujo) kaj kiuj interesas precipe la poŝtistojn, ĉar la tavoloj prezentas internaciajn leterojn en babilona skribo, kiujn iam babilonaj kaj asiraj reĝoj sendis al la egiptaj reĝoj. Ankoraŭ hodiaŭ oni vidas sur la tavoloj ruĝajn streketojn, per kiuj la tradukistoj dispartigis la vortojn unu de la alia, ĉar tiam la skribistoj ne lasis interspacojn inter la vortoj. La nunaj asiriologoj certigas, ke multaj streketoj malĝuste dispartigas la vortojn kaj ke la egiptaj tradukistoj verŝajne erarkomprenis multajn vortojn.

La unua rimedo ebligi internacian interkomunigon do estis la tradukaĵo per tradukistoj. Alia metodo estis la perforta disvasigo de nacia lingvo ĉe la fremdlingvaj popoloj subigitaj. Komprenable tia perfortigo ofte kaŭzis ribelojn kaj militojn, sed ne internacian interkomunigon. Tria provo venki la lingvajn barojn estis la fremdlingva instruado en la lernejoj. Sed ankaŭ tiu ĉi metodo estis ne perfekta, ĉar nur malmultaj lernintoj efektive scias flue paroli fremdan lingvon.

Kiam en la jaro 1874 la poŝtaj administracioj fondis la Universalan Poŝtan Unuiĝon, ili tute ne povis akcepti ĉiujn lingvojn por la unuiĝaj rilatoj. Unueca lingvo ne ekzistis. Pro tio oni elektis la francan lingvon, kiu deŝti la 17-a jarcento jam estis la lingvo de la diplomatoj. Sed oni konsentis, ke la oficiala gazeto de la Internacia Oficejo por la Universala Poŝta Unuiĝo aperu en franca, angla kaj germana lingvoj kaj deŝti 1922 ankaŭ en hispana. Krom tio oni permesis, ke oni uzu ankaŭ aliajn lingvojn en la internaciaj

rilatoj, se la koncernaj administracioj konsentas pri tio. Pro tio okazis, ke ekzemple la germanaj poŝtoficistoj sendas siajn skribaĵojn al Britujo, Danujo, Hungarujo, Nederlando, Norvegujo, Polujo, Rusujo, Svedujo kaj Ĉeĥoslovakio en germana lingvo. Renverse ili ricevas skribaĵojn en la koncernaj naciaj lingvoj. Ne estas dubo pri tio, ke tia multlingveco tre malhelpas la internacian interkomunigon kaj kaŭzas multajn erarkomprenojn.

Tial oni raitas demandoj: Ĉu ne estus pli bone forigi la liberecon pri la uzo de fremdaj lingvoj en la internaciaj poŝtaj rilatoj kaj permesi nur la francan lingvon? Al tio mi devas respondi jenon: Estas pli facile legi kaj kompreni fremdan lingvon ol flue paroli aŭ skribi ĝin. Ekzemple preskaŭ ĉiuj akademie instruataj homoj komprenas latinajn tekstojn, sed nur malmultaj povas paroli latine. Simile estas rilate al la franca lingvo. El la 5000 germanaj superaj poŝtistoj ĉiuj komprenas francalingvajn skribaĵojn, sed nur malmultaj dekoj flue parolas la francan lingvon. Pro tio ni ankaŭ observas, ke nur tre malofte ĉe la superaj poŝtaj direktoj supera poŝta oficisto ekzamenas mezajn poŝtoficistojn pri la franca lingvo. Preskaŭ ĉiam oni komisiis pri la lingva ekzameno gimnazian instruiston, kiu komprenable ne scias la poŝtajn, telegrafajn kaj telefonajn fakesprimojn. Sekve la ekzamenatoj plejparte lernas tion, kion la ekzamenanta instruisto kutime demandas, sed ne tion, kio estas dezirinda por la poŝta kaj telegrafa servo. Ĉe la 100 000 germanaj mezaj poŝtistoj la kono pri la franca lingvo estas multe pli malgranda ol ĉe la superaj, kaj el la 200 000 malsuperaj poŝtistoj nur tre malmultaj scias francan vortojn. Do estas grava faciligo al la germanaj poŝtistoj, ke estas permesate al ili skribi germane al la plej multaj el la najbaraj poŝtaj administracioj.

Estas konata fakto, ke precipe la germanoj zorgis la studadon de fremdaj lingvoj. Ĉu la sukcesoj estas kontentigaj? Ne, tute ne! Ni ne opinii, ke la franca lingvo pli bone prosperas en aliaj ŝtatoj aŭ ke ĝiaj sukcesoj en estonteco estos pli grandaj ol dum la lastaj jardekoj. Certe la franca lingvo estas unu el la plej belaj kaj plej taŭgaj modernaj lingvoj, sed ĝi same nur neperfekte plenumas ĉiujn postulojn de la kreskanta monda interkomunikigo kiel la aliaj naciaj lingvoj. Tion povas fari nur la neŭtrala, facile lernebla Esperanto, kiu „prezentas la forton de la angla, la filozofecon de la germana, la precizecon de la franca kaj la belsonecon de la itala lingvo“.

Dum la venontaj jardekoj la internacia interkomunikigo kreskos tiom, kiom nun nur malmultaj homoj povas imagi. Ĥinujo, Hindujo, Afriko, Aŭstralio kaj Suda Ameriko montras surprizan evoluon, kaj la mondlingva problemo, kiu nun estas urĝa, fariĝos urĝega. Kun natura neceseco Esperanto altrudos sin al la poŝtaj, telegrafaj kaj telefonaj administracioj. Senfadene oni povos telefoni kun ĉiu homo sur la terglobo, kaj se la nuna rapideco de la flugmaŝinoj nur sesobliĝos, ni povos vekuri kun la suno ĉirkaŭ nia planedo.

Ekkonante la naturan necesecon de la mondhelpingvo Esperanto, al kiu precipe la franca lingvo liveris valorajn elementojn, niaj francaj samideanoj unue post la milito refondis sian Asocion Esperantistan de Francaj Poŝtoficistoj, garantiantes al si gravan rolon en la kreado de faka vortaro kaj dokumentante al la tuta mondo, ke ili pli alte satas Esperanton kiel taŭgan helpon ol vane altrudi sian lingvon al internacia interkomunikigo, kiu nepre postulas facile lerneblan neŭtralan lingvon por la amasegoj. La procedo de la francaj poŝtistoj, kiuj jam eldonis fakan Esperanto-gazeton, ĉie faris grandan impreson kaj konvinkis multajn dubemulojn en aliaj

landoj, ke Esperanto certe fariĝos la lingvo de la Universala Poŝta Unuiĝo.

La lernado de fremda lingvo plialtigas la instruitecon de la lernintoj. Sendube dum la venontaj jaroj multaj poŝtoficistoj, eĉ el la malsuperaj klasoj, lernos Esperanton. Do estus malutilo por la francaj poŝtistoj, se ili sole nur sciis sian gepatran lingvon. Per obstina kontraŭbatalo al Esperanto ili povus atingi nur mallongan prokrastigon en ties oficiala alprenado. Sed areto de antaŭvidaj francaj poŝtistoj ĝustatempe forigis tiun ĉi danĝeron. Ilia rapida kaj decida ago eĉ vekis la atenton de alilandaj poŝtaj administracioj tiagrade, ke du el ili jam oficiale kolektis la adresojn de siaj Esperantistaj oficistoj. (Vidu ET n-oj 60 kaj 66.)

Jam delonge la poŝtaj, telegrafaj kaj telefonaj administracioj sentis la bezonon de komuna mondlingvo. Mi atentigas nur pri tio, ke dum la Dua Universala Telegrafa Konferenco en Vien en la jaro 1868 la portugala delegito Valentin Evaristo do Rego postulis, ke oni kreu neŭtralan lingvon por la telegrafa servo. La konferenco malkonsentis, ĉar ĝi opiniis, ke la postulo estis neplenumebla. La poŝta apero de Esperanto ŝanĝis la situacion. Sed tamen la administracioj ne povis enkonduki Esperanton pro manko da oficistoj, kiuj scipovis la lingvon. Ĝis nun oni konas la adresojn de ĉirkaŭ 2000 poŝtaj, telegrafaj kaj telefonaj Esperantistoj; sed devus esti almenaŭ 100 000 Esperantistoj inter la du milionoj da oficistoj de la mondo, se oni volus oficiale enkonduki Esperanton ĉe la poŝto, telegrafo kaj telefono. Tiun celon ni certe povos atingi, se oni ĉie aranĝos Esperanto-kursojn en poŝtaj rondoj, se la gajnitoj aliĝos al Internacia Ligo de Esperantistaj Poŝt- kaj Telegraf-Oficistoj, se la poŝtaj, telegrafaj kaj telefonaj administracioj energie subtenos nian movadon, kaj se oni enkondukos Esperanton almenaŭ en la superajn lernejojn.

Oni kalkulu: Se ĉiu Esperantista poŝtoficisto gajnas nur kvar novajn adeptojn dum la unua jaro de nun, ni havus 10 000 poŝtajn samideanojn; se ĉiu el tiuj ree gajnas nur kvar novajn dum la dua jaro de nun, nia nombro jam estus 50 000; dum la tria jaro la nombro povus kreski sammaniere ĝis 250 000, dum la kvara jaro jam ĝis la nombro de 1 250 000. Tiamaniere la nombro de la Esperantistaj poŝtoficistoj baldaŭ atingus la nombron de la poŝtoficistoj, kiuj entute estas en la mondo. Tial, samideanoj, instigu aliajn!

La Cirkulero de ILEPTO.

Bern, la 1. sept. 1923.

Tre estimata sinjoro!

La Internacia Ligo de Esperantistaj Poŝt- kaj Telegraf-Oficistoj (ILEPTO), sidejoj Bamberg, Paris, Bern, decidis adresi petkskribojn al la Internaciaj Poŝt- kaj Telegraf-Unuiĝoj (Oficejoj en Bern) celantajn al enkonduko de Esperanto kiel facile lernebla, neŭtrala internacia lingvo por iliaj multnombraj interrilatoj kun fremdaj administracioj kaj vojaĝantaj personoj; poste ankaŭ kiel sola kongresa kaj kontrakta lingvo.

Certe la praktika uzado de Esperanto en la internaciaj poŝtaj, telegrafaj kaj telefonaj interrilatoj fariĝus tre ekonomia kaj taŭga.

Multaj oficistoj ĉiulandaj jam scipovos Esperanton, kaj ĉiuj — almenaŭ la junaj — tre volonte lernus kaj uzados ĝin.

De interparolado kun la estraro de supre nomitaj Unuiĝoj, tre favoraj al Esperanto, rezultas ke, por atingi nian gravan celon, la konsento de la plimulto de la registaroj aŭ poŝt- kaj telegraf-administracioj estas nepre necesa. Ĉi tiu konsento nur estas atingebla konvinkigante la oficialajn rondojn pri la praktika uzado kaj granda

disvastiĝo de nia kara lingvo kaj pri la nombro de ĝiaj adeptoj aŭ partianoj, precipe ankaŭ per aldono de multaj kvalitaj subskriboj al niaj pet-skriboj.

La tre estimata Esperanto-Kongresa Komitato kaj Esiraro de Universala Esperanto-Asocio varme subtenas kaj rekomendas nian agadon kaj petas kun ni la ŝatatajn estrarojn de ĉiuj naciaj kaj internaciaj Esperanto-societoj, kiel precipe ankaŭ la fervorajn delegitojn de UEA, kolekti sur la aldonataj diversaj listoj* ĉiulande multajn valorajn subskribojn (duoblajn: Poŝto kaj Telegrafo), precipe de registaroj, konsilistoj, administrestroj, estroj de ekonomiaj, sciencaj, filantropaj, teknikaj kaj turismaj societoj (ekzemple komercaj ĉambroj, administracioj ktp.); industriaj, komercaj kaj transportaj firmoj, kaj de aliaj eminentaj personoj, Esperantistoj aŭ ne-Esperantistoj.

Bonvolu do, tre estimata samideano, kolekti aŭ kolektiĝi tiom da subskriboj kiel eble, sur la enmetitaj aŭ eĉ aldonataj novaj listoj, kaj zorge resendi ilin kiel enskribitan leteron aŭ aferpaperon ĝis plej malfrue fine de januaro 1924 al la komisiita subskribanto de tiu ĉi cirkulero.

Dezirante bonegan sukceson, ni prezentas al vi, tre estimata sinjoro, kun nia kora antaŭdanko niajn plej sincerajn salutojn.

Por ILEPTO:

D-ro Ed. Spielmann, vicprezidento

P. K. 174, Transito, Bern, Svis.

NB. Ĉia abla monsubteno por kovri la pres-kostojn kaj poŝtelspezojn rilatajn al nia grava entrepreno estos plej kore kaj danke akceptata.

* La aldonitaj listoj estas haveblaj de ILEPTO laŭ la indikita adreso. Karo sufiĉas.

Kroniko.

Por servi nian legantaron per ĉiam aktuala, fidinda kaj kompleta informaro, ni bezonas sciojn (sur poŝtkarto aŭ aparta folieto unuflanke skribita, sed ne inter administraj aŭ privataj scioj) pri ĉiu novaĵo el la Esp. movado. Kondiĉoj: rapide, koncize, fidinde, legeble (precipe nomoj).

Afriko.

Madagaskaro.

La malnovaj Esperantistoj laŭŝajne reunuiĝas. Ni ricevis plurajn informojn el Tananarive.

Ameriko.

Meksiko.

La laboroj de la konferenco de Venecio instigis viglan intereson. Komitato sendis detalan cirkuleron pri la rezultoj de Venecio al ĉiuj komercaj kaj industriaj ĉambroj de la lando.

Usono.

Oficiala instruado en la lernejoj por blinduloj de "Perkins Institution" en Watertown kaj de "Antivich College" en Yellow Springs.

Eŭropo.

Bulgarujo.

La Ministerio de la Komercio per speciala cirkulero invitis la komercajn ĉambrojn en la lando rekomendi al la komercindustriaj rondoj la bulgarlingve eldonitajn de BES protokolojn de la Venecia Konferenco. La sama ministerio aĉetis kvanton de la broŝuro.

La Ministerio de la Milito eldonis specialan ordonon per kiu estas permesata al la oficioj por Esperantistoj insignon.

Tatar Pazarĝik. La 24. junio okazis la jarkunveno de la loka grupo "Verda Stelo"; elektita nova komitato: prez. Dim. P. Tuĝarov, sek. Nik. Cobanov, kas. Fino Stojanova, bibl. Ali Nazmi.

En multaj aliaj lokoj de la lando la movado plivigliĝis.

Jugoslavio.

En Moslavina Popovaĉo tri kursoj en la blindul-instituto.

Rusujo.

Virebsk. Vigla propagando de nia afero, en la prezidantaro de la gubernia sindikata sovetoj, kiu dissendis cirkuleron pri E. Grupoj kaj kursoj en la gubernia plena komitato, en gubernia fakoj de ŝtata politiko, en laborista klubo sindikata "Profratern", en instituto pri popolklerigado, Parolado en societoj de artoartistoj, laborplacato. Paroladoj en societoj de medicinistoj ktp. Moskva. Kurso en fabriko "Moskvoŝvej". Parolado en metalurgia fabriko "Ruĝa vojo". Pluaj kursoj en kluboj je la memoro de la 9a de januaro kaj de popolo komisararo de provizado.

Petrogrado. Parolado en klubo de oktobra fervojo, en regiona ekonomia teknika lernejo. La grupo aranĝas ĉiusemajne propagando-paroladojn pri E. kaj aliaj temoj rilataj al E.

Minsk. Parolado en ĝenerala kunveno de la unuigo de la Popol-interligo. Rezolucio pri organizo de esperanta sekcio akceptita.

Odessa. Parolado de d-ro Rublev en la klubo de la kuracista sindikato. Krome en klubo de medicina instituto. Kursoj aranĝataj. Esperanto-grupo de SEU en teknika lernejo de Odessa. En lernejo de socia edukado lerneja ekspozicio kun Esperanta fakoj.

Riŝeĉovo (Saratov gub.). Esperanta sekcio en laborista komunista klubo.

Grozniĝi (Kaŭkazo). Parolado en la urba teatro.

Koronev (Kiev-Voroneĝ-fervojo). Parolado en fervoja klubo.

Kingissep (Petrogr. gub.) Parolado en "Domo de Klerigado" en estona lingvo.

Ruza (Moskv. gub.). Speciala propagando inter instruistoj kaj lernantoj.

Aŝtrahan. Grupetoj en "Klubo de 5. oktobro" kaj "Leŭtenanto Smid", en klubo de naciaj malplimultoj. Kurso speciale por tartaroj.

Ceboksari (Kavasa aŭtonoma regiono). Rusa koncerto kun rusa kaj kavasa dramoj. Parolado pri Esp.

Kraskodaro. Fondo de studenta rondeto.

Saratov. Okazis unua gubernia Esp. konferenco.

Feodosio (Krima insulo). Kurso kun 15 personoj.

La Internacia Konferenco pri Impostado laŭ Tervaloro

(Oficejo 11, Tothill Street, London S. W. 1), kiu kunvenis en Oxford (Anglujo) en ĉeesto de reprezentantoj el 14 landoj de la 15-20. aŭgusto, dissendis cirkuleron en Esperanto, kiun ni re-presas ĉi-sekvante:

Manifesto al la mondo.

Unuanime aprobita.

Al Regantoj ĉiulande saluton!

Ni, disĉiploj de Henry George, el dek kvar nacioj, dum Internacia Konferenco en Oxford, Anglujo, kunvokite de la Unuigita Komitato por Impostado laŭ Tervaloro, sendas ĉi tiun komunikon kaj vokon al ĉiu respondanta por la regado de la nacioj.

La milito por forigi militon finiĝis per paco, kiu forigis pacon. Oni bezonas novan ŝtatpolitikon, kiu celas la liberecon de la popolo, kaj kies metodo estas la justio; kaj tian ni ĉi tie proponas, sciante, ke ĝiaj pretendoj estas neneigeblaj de vidpunkto politika, komerca, ekonomia, aŭ justeca.

Ni kredas, kiel memevidentan veron, ke la sistemo de terposedo estas en ĉiu lando la ĉefa faktoro en la vivo de ĝia popolo.

Klare, la nejusta malegaleco de havo, la persista depremiteco de komerc kaj industrio, kaj la daŭro de malriĉeco kun la malvirto, krimo kaj mizero, kiujn ĝi naskas, rezultas el la privata monopolo de la tero, la privata konflikto de ter-pago, kaj la malkonfeso de la popola rajto al la tero de sia lando.

Klare, ju pli prema estas tiu termonopolo, des pli malalta estas la pago por ĉia laboro kaj la profito el komerc, industrio, kaj ŝparado, kaj des pli malriĉa la ekonomia, socia kaj spirita stato de la popolo.

Klare, ĉi tio estas demando tutmonda, ne nur loka aŭ nacia. Kiom gravas por germano aŭ franco, li estu laboristo aŭ aferisto, ĉu la monopolistoj, kiuj konsumas liajosto la enorman ekonomian renton de la Ruhr-minejoj, loĝas en Francujo aŭ en Germanujo!

Klare, la malbonojn, kiuj en la nacio naskas konstantan civilan lukadon, kaj internacie militon, por ĝajni pli da tero, aŭ da monopolo de ter-valoroj, oni povas fini nur, forigante la privatan termonopolon kaj la nejustan impostadon, kiuj nun ekzistas pro tio, ke de la popolo estas rabita ĝia komuna rajto al la Parolado.

Por tion efektiviĝi, ni insiste rekomendas, ke ĉies egalan rajton al la tero oni konfesu jenmaniere: oni kolektu por la publika enspezo la ekonomian renton de la tero per rekta imposto laŭ tervaloro, kaj ĉiun alian imposton forigu; anstataŭigante la komerc-defruan kaj milito-naskan tarifaron internacian per tiu absoluta libereco de komerc, kiu estas la natura rajto de ĉiu homo.

Ni avertas vin, ke tio devas fariĝi, kaj rapide, por fini la ĉiam pli kreskantan malkontenton, kaj por malhelpi sangnan revolucion, la disfalon de civilizacio, kaj la forigon de regantoj sen scio aŭ kuraĝo, agi antaŭ ol estos tro malfrue; ĉar la popola koro en ĉiu nacio estas plena de maldolĉo pro suferado, pro troŝarĝo imposta, kaj pro tio, ke la popoloj kaj iliaj infanoj estas forbaritaj el la tero, kiu naskarĝe apartenas al ili.

Socia Vivo.

Rimedo kontraŭ senlaboreco propono de brita industristo.

S-o Seeborn Rowntree, la fama brita industristo, en serio de artikoloj en "The Times" proponas, ke centra-organizaĵo en ĉiu industria lando, faru sciencan enketon pri la kaŭzoj de senlaboreco kaj la rimedoj alprenitaj por malhelpi ilin. Resumo de tiuj artikoloj aperas en Sociaj Informoj, la ĉiusemajna eldonaĵo de la Internacia Labora Oficejo.

S-o Rowntree opinias, ke rezervo da laboristoj estas necesa por la bona funkciado de industrio, kaj ke sekve tiuj rezervlaboristoj rajtas vivtenadon. Aliaj industriaj riskoj estas jam assekurataj, kaj ŝajnas juste, ke la industrio rezervu monon por pagi la laboristaron dum neaktivaj periodoj. Alivorte assekuro kontraŭ senlaboreco estus rigardata kiel ordinara detalo de la produktokostoj, same kiel la ceteraj assekuropagoj.

Rilate al rimedoj kontraŭ senlaboreco, s-o Rowntree ekzamenas la interrilaton de financaj agoj kun ciklaj ŝanĝoj, la regularigon de la demandado por laborantoj per la klopodoj de centraj kaj lokaj aŭtoritatoj, la plibonigon de la transportoj, kaj la interrilatojn de salajroj kaj prezoj kun senlaboreco. Li montras, ke la ŝanceliĝoj de la komerc, kaj la konsekvencaj periodaj krizoj kaj perioda senlaboreco, estas pligravigataj per la fakto, ke la salajroj malaltatiĝas al la prezoj, kiam tiuj ĉi plialtiĝas, kaj ke la malpliigo de salajroj ofte malaltatiĝas al la malpliigo de la prezoj kiam ĉi tiuj malplialtiĝas. Li pensas, ke la rimedo kontraŭ tiu ĉi tendenco troviĝas en sistemo de profitpartigo, laŭ kiu la laboristaro ricevas la plej altan rekompencon

kiun la industrio povus doni dum normaj periodoj, kaj aldone dum prosperaj tempoj, difinitan parton de la profitoj superantaj la sumon sufiĉan por aliri al la industrio la kapitalon necesan al ĝia sana disvolvigo.

S-o Rowntree diras, ke, kvankam helpolaboroj estis ĝis nun konate malkontentigaj, ili estos daŭre necesaj iajfoje. Li insistas, ke ĉiu loka aŭtoritato devas pripensi, dum rilate prosperaj periodoj, pri la laboro, kiun oni povus entrepreni, se senlaboreco fariĝus akuta. Oni devus atentiĝi precipe pri laboro vere valora, kiu finfine helpas la komercon, aŭ kiu alimaniere favoras la bonstaton de la komunumo. La domkonstruado, speciale, konsistigas helpolaboron de la plej bona speco. Tamen la financaj bazoj de tiaj laboroj devos esti pli largaj ol ili estis ordinare ĝis nun, por ke ŝarĝoj tro pezaj ne surmetiĝu sur individuajn lokojn.

Internacia Labora Oficejo.

Aktuala Politiko.

Novaj ministroj en Polujo.

La prezidanto de la pola respubliko aprobis la eksigajn peticojn de la komerca ministro Kucharski, de la financ-ministro Linde kaj de la ministro por publika protekto Darowski. Novaj ministroj estas: Szydłowski, komerca ministro, Kucharski, financ-ministro, Smulski, publika protekto.

Meksiko.

Oficiala komunikado sciigas, ke la registaro de Usono oficiale rekonis la novan registaron de Meksiko.

Kabineta ŝanĝo en Japanujo.

La nove formita kabineto japana konsistas el: ministraro prezidanto kaj ministro de la eksteraj aferoj: Admiralo Jamo Moto, internaj aferoj: Barono Goto, financoj: Jomosoka, milit-ministro: Tanako, agrikulturo, komerc kaj juro: Dem, trafiko kaj instruado: Inuki Jamaushi, maristaro: Takarebe.

Internacia abitraco.

Italujo-Grekujo. En la jam en la ĵurnaloj konata konflikto itala-greka la greka registaro alvokis la Ligon de Nacioj pro ordiga decido. La traktadoj de la konsilantaro daŭradas.

Libera Urbo Danzig. Refutante la diversflankajn troajn pretendojn la komitato de la Ligo de Nacioj speciale kunveninta por senperaj traktadoj inter la libero urbo Danzig kaj Polujo ordigis laŭ la ĵus aperinta raportoj ne malpli ol 50 disput-punktojn. La konvencio difinita de ambaŭ ŝtatoj kaj aprobita de la komitato de la L. d. N. koncernas ĉefe demandojn de la havena komitato, de la dogan-administrado, la jur-traktado de poloj en Danzig, de la eksterlanda reprezentado ktp.

Ekonomio.

La internaciaj prezo-ŝanĝigoj.

La indeks-nombroj de pograndaĵ prezoj en la unua kvaronjaro de 1923 estas markitaj per altigema tendenco en preskaŭ ĉiuj landoj. Al la prezo-leviĝo sekvis prezofalo en la 2-a kvaronjaro en la plej-parto de la landoj jam publikigitaj statistikojn. Tio estas: Anglujo, Aŭstrio, Belgio, Ĉeĥoslovakio, Egiptujo, Hindujo, Italujo, Nederlando, Sudafriko, Svedujo, Svisujo kaj Usono.

La plej nova malleviĝo estas speciale konstatabla en Usono, sekve de la daŭra industria aktiveco. En kelkaj landoj la lastaj ciferoj ne montras por tiel diri iun ŝanĝon dum la lastaj monatoj. Tiel estas en Hispanujo, Japanujo, Nov-Zelando. Aliflanke la prezoj travivis alleviĝegon en Germanujo, Aŭstrio, Danujo kaj Francujo. En Germanujo la falego de la marko — depost la komenco de julio malsuperinte la aŭstrian kronon — estas akompanita de nova prezo-leviĝego de la pograndaĵ prezoj kaj de la vivkostoj. La oficiala indeks-nombro de la pograndaĵ prezoj estis 817000 en majo, sed atingis dum la monato junio la fantazian nombron de 1938500. Tio signifas altigon de ĉirkaŭ 137% dum la daŭro de nur unu monato. En Francujo la ciferoj de marto markigas la plej altan punkton de malrapida prezo-leviĝego, kiu komencis jam en februaro 1922. La indeks-nombroj por aprilo kaj marto registrigas malaltiĝon, laŭŝajne nur nedaŭran, ĉar la juni-indeks indikas denove malfortan levigon, kvankam la nivelo restas ankoraŭ sub tiu de la pasinta kvaronjaro, dume la levigebla moviĝo de la podetal-prezoj kaj de la vivkostoj seninterrompe daŭradas depost septembro 1922. En Danujo la prezoj komencis regule malaltiĝi depost aŭgusto 1922, escepte malforta levigo en majo 1923. En momento la prezo-nivelo estas preskaŭ 20% sub la antaŭlastaj ciferoj.

R. Kr.

La valuto-problemo. — Sovetlandaj monunuoj.

Unu el la plej komplikaj kaj taginteresaĵ demandoj de la nuntempa landa ekonomio estas sendube tiu pri valuto kaj ĝia reguligo. La tuta monda milito tiom kaosis ĝion en tiu ĉi demando, ke plej grandaj financistoj ĝis nun ne povis solvi ĝin pli malpli kontentige. La valuto en plimulto da landoj konstante malvalorigis, en unuj malrapide, en aliaj katastrofe. Multnombraj nombroj

ornamas kalkulo kaj kontrolojn de la plej diverslandaj komercaj organizaĵoj.

Soveta Registaro post multaj pridiskutoj solvis la problemojn pri reguligo de valutistaro en Sovetlando laŭtute.

Nun ni havas en Sovetlando kvar monunuojn. Certe iom post iom tri el tiuj monunuoj estos anstataŭigitaj per la kvara kaj tio estas nur demando de tempo.

Daŭra malvalorigo de rusa rublo, komenciĝinta jam de komenco de la milito kaj plirapidigita de ĝiaj revolucioj, kaŭzis tiun multnulecon de sovetlandaj prezoj, kiuj jam enproverbiĝis kaj havigis por si spiritan nomon de astronomiaj prezoj.

Tiu ĉi multnuleco kaŭzis certe sufiĉe grandajn malopordunojn por diversaj kalkuloj, ĉar ofte en kalkuloj kaj en kontroloj ne sufiĉis la spaco por lokigi ĉiujn nulojn. Pri haliĝo de plua valutistaro oni jam ne zorgis, ĉar tio en tiamaĵ cirkonstancoj estis afero nebla. Oni nur deziris forigi tiujn ĉi nulojn kaj ĉiujn malopordunojn, ligitaĵoj kun ili. Solvo venis tre simpla. En 1922-a jaro aperis nova monbileta serio, kies ĉiuj rublo egalas 10000 rublojn de ĉiuj antaŭaj eldonoj. Tamen tiu reformo certe ne povis haltigi pluan malvalorigon. Tiam la Soveta Registaro eldonis por 1923-a jaro novan serion, kies 1 rublo egalas 100 rublojn de 1922-a jara eldono aŭ 1000000 rublojn de ĉiuj antaŭaj eldonoj. Krom tio estis ŝanĝitaj por noveldonitaj monbiletoj kaj poste ŝanĝitaj ĉiuj monbiletoj eldonitaj antaŭ la jaro 1922. Nijaj prezoj do nun tute ne similas nombrojn, signifantajn distancojn inter diversaj steloj astronomiaj. Tiu ĉi monunuo, t. e. papera rublo, kompreneble daŭrigas sian malvalorigon kaj nun preskaŭ neniu uzas ĝin por kalkuloj pro troa maloporduneco.

La dua monunuo estas ora rublo. Ĝi nun, same kiel paperrublo, estas pli kaj pli anstataŭigata per alia unuo, nomata „ĉervonco“, pri kiu mi parolos pli sube. Antaŭ nelonge ora rublo, aŭ pli ĝuste ĉar-tempaj oraj moneroj, estis objekto de la plej malnobla spekulado. Sed nun ĝi preskaŭ plene ĉesis. Privataj personoj nun ne rajtas havi ĉar-tempajn orajn monerojn. Nun ĉiutage Centra Valorfiksanta Komisiono publikigas kurzon de ora rublo, starigata konforme al la kurzoj de aliaj, ankaŭ eksterlandaj, valoroj. Tiu ĉi arango similas iom tiun en Germanujo, kie estas enkondukitaj t. n. ŝlosilnombroj per kiuj oni multobligas la prezojn fiksitajn en oraj markoj. Ora rublo nun iĝis plene teoria unuo, ĉar ĉiuj pagoj estas farataj ne per oraj moneroj, sed per paperrubloj laŭ la kurzo.

Ĉefan lokon en tuta nuna sovetlanda masstrumado kaj vivo okupas ora monunuo nomata „ĉervonco“ (ĉervonec). En ĉar-tempo tiu ĉi nomo estis iufoje uzata por nomi speciale dekruban oran moneron, sed nun, simile al angla pundo egalanta 20 ŝilingojn, ĉervonco estas premita kiel fundamenta unuo egalanta 10 rublojn aŭ 1000 kopekojn. Regna Banko eldonis specialajn monbiletojn, kiuj estas garantiataj per regna provizo de eksterlanda kaj rusa metala valuto, plateno, oro, arĝento, diamantoj kaj aliaj valoroj. Ĉervoncoj estas la unua granda kaj grava paŝo por transiri al valuto metala, ĉar ĉervoncoj, laŭ si mem estante ankoraŭ paperaĵoj, ne malvalorigas kaj estas ĉiam ŝanĝeblaj en Regna Banko kontraŭ eksterlanda valuto. Valoro de ĝis nun eldonitaj ĉervoncoj egalas laŭ borsaj kurzoj sumon da paperrubloj, uzataj en landa masstrumado. Entute ĉervoncoj kaj paperrubloj estas nun du monunuoj ĉar-teoriaj, kiam la du aliaj estas nur teoriaj. Entute en landa masstrumado nun estas okupitaj 200 milionoj da orrubloj (= 0,1 ĉervonco) kontraŭ antaŭmilitaj 500 milionoj.

Preskaŭ ĉiuj institucioj transiris nun al kalkulado en ĉervoncoj, kiel plej oportuna monunuo. Salajroj estas pagataj ankaŭ parte en ĉervoncoj, parte en paperrubloj. Cio evidentigas, ke ĉervonco estas tiu monunuo, kiu restos por ĉiam en Sovetlando.

Fine ekzistas ankoraŭ kvara, teoria, monunuo: var-rublo. Ĝi estas starigita por pli oportuna proporciigo inter salajroj kaj la plej necesaj por vivo varoj. Estas starigita speciala listo de varoj, kiuj kune kostas antaŭmilitaj 10 orajn rublojn. Ĉar prezoj por komercaj pialitigis kompare kun la ora rublo, tiu ĉi aro de vivnecesaĵoj kostas nun jam ne 10 orajn rublojn laŭ kurzo kaj ne 1 ĉervoncon, sed je 80% pli kare.

Posedajne estas rerigardataj prezoj de varoj, registritaj en la listo, kaj konformigataj al la plej lastaj bazarprezoj. Tiamaniere ekzemple la 22-an de aŭgusto tiuj ĉi vivnecesaĵoj kostis 2773 rubl. 40 kop. (paperaĵoj), — sekve 1 var-rublo = 2773 r. 54 k. En la sama tago 1 ora rublo kaj 0,1 ĉervonco = 157 r.

La salajroj ordinare estas kalkulataj en var-rubloj, sed pagataj, kiel mi jam diris, per ĉervoncoj kaj paperrubloj. Tia arango permesas, ke laboristoj povas ricevi por 30 var-rubloj preskaŭ saman kvanton da vivnecesaĵoj, kiun li povis antaŭmilitaj ricevi por 30 orajn rublojn, kvankam li laŭ kurzo ricevis pli ol 30 orajn rublojn.

Estas jam entreprenitaj paŝoj por enkonduko en Sovetlando de metala valuto kaj Regna Monerfarejo, laboranta jam de pli ol du jaroj, nun

preparas ĉiutage 450 000 orajn kaj arĝentajn monerojn. Jam nun estus eble enigi en vivon metalan rublon, sed kelkaj konsideroj devigas tion dume ne efektiviĝi. Tamen plej malfrue post du jaroj Ruslando denove havos metalan valuton.

George N. Teterin, Petrograd.

Tekniko.

Energiotransportado per alttensiaj elektraj fluoj.

En la nordaj ŝtatoj de Ameriko oni ĉiam pli kaj pli uzas la alttensiajn fluojn por la transportado de energio. Ju pli grandaj estas energio kaj distanco, des pli alttensia devas esti la elektraj fluoj. Hodiaŭ oni transportas eĉ per fluoj, havantaj tension de 165000 Volt. Oni nun konstruas kondukilojn de 220000 Volt.

La kaŭzo de tiu ĉi klopodo estas duobla: unue, kiel ĉiam la „ekonomio“, due la certeco de la uzinoj. Oni devas konsideri la grandajn akvo-forojn de Ameriko kaj oni tuj komprenas ke la transportado de ties energioj estas tre grava.

Ĉe ni oni ne ankoraŭ studis sufiĉe la kondukadon de alttensiaj fluoj. En Ameriko tiuj kondukiloj estas eĉ pli certaj ol tiuj por malalttensiaj fluoj. Profesoro Ryen certigas, ke la kondukiloj por 150000 Volt estas pli certaj ol tiuj por 110000 Volt.

Por ke ni havu ideon pri la kvanto de la transportata energio en Ameriko, mi komunikas kelkajn nombrojn. La Southern California Edison Co. laboras nuntempe per 100000 ĉevalpovo sed en 15 jaroj oni esperas pligrandigi ĉi tiun je la 7 1/2 oblo.

Aĝrikulturo kaj industrio ĉiam bezonas pli kaj pli da energio. Oriente oni intencas kunigi la elektrajn produktojn de Washington, Boston kaj Niagara. Tiel oni havos 17 milionojn da ĉevalpovo. Se la plano realiĝos, oni ŝparos 75% de la hodiaŭ uzata ŝtonkarbo. Grandaj kaj kuraĝaj entreprenoj estas tiuj ĉi, kvazaŭ nekompreneblaj inter niaj malriĉaj situacioj.

Laŭ Hungara Natursciencia Revuo
Josefo Major, Budapeŝto.

Internacia trafiko.

Striko de aviadistoj.

Depost somero de 1921 la franca-rumana aviaĉa societo estigis ordinaran aer-komunikigon en Eŭropo. Flugmaŝinoj regule transportis personojn tra Paris—Prah—Budapeŝt—Moskva. La vojaĝdaŭro inter Paris kaj Prah estis nur 6 horoj. Oni veturis per la rapideco de 200 km pohore. Krom la aviadisto oni portis per unu maŝino 4 personojn kaj 100 kg da pakajoj.

Nun oni sciigas, ke la aviadistoj de la societo komencis strikon kaj kune forvojaĝis de Prah al Strasbourgo. La kaŭzo de ilia striko krom la salajrodiferencoj estas tio, ke ili ne povas surteriĝi en Germanujo. Oni esperas baldaŭn kompromison, ke la trafiko ree komenciĝos.

Senfadena telegrafado tra la Trankvila Oceano.

La granda firmao „The Radio Corporation of America“ deziras plibonigi la radiotelegrafadon inter Ameriko kaj Orientazio. Tial ĝi transprenis la stacion de la Marconi-Societo kaj konstruos novan stacion tra la orientaj bordoj. Tiu fakto estas tial grava, ĉar dum la milito ruiniĝis la kablo inter Vancouver kaj Aŭstralio kaj la kontakto estis ebla nur tra Eŭropo. La sama societo aĉetis grandan areon sur la insulo Long Island kaj tie ĝi intencas konstrui la plej grandan stacion de la mondo. Ĝi kostos ĉ. 20 milionojn da dolaroj. La unua plej granda stacio estas tiu en Nauen (Germanujo) tra la areo 300 hektaroj (1 hektaro = 10000 kvadratoj). La nove konstruota stacio havos la vastecon de 2400 hektaroj. En Francujo (Bordeaux) oni konstruas nun pli grandan stacion ol tiu en Nauen, sed malpli grandan ol la konstruota stacio en Ameriko.

Josefo Major, Budapeŝto.

Filatelio.

Rusujo.

Aperis, okaze de Tutruslanda Agromonio kaj Industria Ekspozicio en Moskvo, nova tre bela serio: 1 rublo (rikolisto; flava kaj bruna), 2 rubloj (semisto; hel- kaj malhelverda), 5 rubloj (aŭtlokomobilo; blua kaj jazuza) 7 rubloj (tutvidiĝo de la ekspozicio; rozkolora kaj ruĝa). Formato granda. Ĉiuj nedentumitaj.

Por flugposio aperis serio de poŝtmarkoj kun aeroplano. Valoroj: 1, 5, 10, 20, 30, 40 kaj 50 rubloj.

G. N. T., Petrogrado.

Abon-Tarifo.

Ni petas noti la novajn prezojn por la sekvantaj landoj:

Esotio sv. ik. 0.20 po numero
Latvio laŭ 0.20 „ „
Litvio lido 0.20 „ „

Por Germanujo kiel kutime ni akceptas abonojn nur per la poŝto. Laŭ la nova poŝtarango la prezo nun estas fiksitaj laŭ la ŝlosilnombro de la listoj.

La monata abonprezo fundamenta estas Mk. 0.50. La ŝlosilnombrojn sciigas la poŝtoŝteĝoj ĉe mendo. — Rekte sendataj unuopaj numeroj kostas fundamentan prezon de Mk. 0.20 x ŝlosilnombro plus sendkostoj.

Ĉi-tiukaze ni petas pri nepra atento de niaj tarif-kondicioj. Pri domagoj kaŭzitaj per neatento suferas la abonanto.

Tutmonda Kongreso religia en la jaro 1925.

En Ameriko ekiĝis en la jaro 1910 la penso forigi la diferencojn inter la diversaj kristanaj eklezioj kaj kunigi ĉiujn en unu solan eklezion tutmondan de la Kristana religio. Efektivigo de tiu ĉi penso multe helpas al la repaĉigo de la diversaj popoloj, dividitaj tiel de la lingvaj kiel ankaŭ de la diversaj ekleziaj baroj. La mondmilito malhelpis la pli fruan okazigon de la tutmonda kongreso religia. Nun ĝi okazos en 1925. Kongresurbo estos Washington en Ameriko. La kongreskomitato laboras jam de pli longa tempo, dissendante invitojn, programojn ktp. Reprezentantoj de ĉiuj konfesoj — krom la romkatolika — akceptis la invitojn kaj promesis entuziasme sian kunlaboron. Kongreslingvoj supoze estos: angla, franca, germana kaj greka. — Interese estas, ke same en 1925 okazos tutmonda romkatolika koncilio kiel daŭrigo de tiu interrompata en 1870.

P. E. S.

XII-a Germana Esperanto-Kongreso Plauen (Vogtlando).

Pentekosto 1924 (7—10. junio).

Kvara komunikoj.

Ni povas ĝojligite konstati, ke multaj gesamideanoj anoncis sin dum la kongrestagoj en Nürnberg. Aligis ĝis nun entute ĉ. 250 personoj.

Nia celo estas, prepari la aranĝojn tiamaniere, ke la diversaj esperoj de niaj gegastoj estu plenumataj. Tial ni petas: Skribu jam nun viajn specialajn dezirojn!

La antaŭlaboroj por la kongreso estas multe malfacilitaj pro la terura senvvalorigo de nia valuto. Mil simplaj kongresinsignoj el preparita kartono kostis jam fine de aŭgusto 2000000 markojn. Restas la aliaj grandegaj elspezoj. Do bonvolu kredi, ke nur devigite per la cirkonstancoj ni fiksis la ĉi-sekve sciigatan novan kotizon. Gesamideanoj, pagu la kotizon volonte kaj helpu al la ekonomiaj malfortuloj, ke ankaŭ ili povu viziti nian XII-an!

Kotizo estas la 10obla de la literafranko; edzinoj kaj infanoj pagas nur la Soblajn literafrankon. Eksterlandanoj ni petas, ke ili pagu la almenaŭ ŝoblan de la kotizo por Germanoj, aŭ en germana aŭ en iliaj valutoj.

Aligo. Por ŝpari la altajn sendkostojn, ni rekomendas, ke oni kolektu en la grupoj la aliĝilojn kaj kotizojn kaj sendu ilin kune al ni. Oni petu la necesan kvanton de aliĝil-formuloj de la ĉi subskribinto.

Donacojn por la kongresa kaso ni multe bezonas kaj ĉi kore petas tiurilatan subtenon.

Adreso por mensendo: Vogtländische Bank, Plauen. La banko havas poŝtekan konton Leipzig n-o 898. Oni bonvolu informi la bankon skribante, ke la sendita mono koncernas la Germanan Esperanto-Kongreson.

Fakkunsidoj. Oni anoncu dezirojn fakkunsidojn plej eble baldaŭ kaj sciigu al ni samtempe la adreson de la gvidonto. Ĉiu fakkunsido havu sian programon, kiun oni fiksu sufiĉe frue, por ke ni povu publikigi ĝin.

Adreso por korespondadoj estas tiu de la subskribinta kongresa sekretario

Hermann Scheider
Plauen (Vogtl.) Gunoldstr. 40.

Parolejo.

Sub tiu ĉi rubriko laŭ disponebla loko estas lojale enpresataj ĉiuj sciigoj, informoj, kritikoj, liberaj vortoj ktp. La redakcio tamen ne prenas sur sin iun respondecon pri la enhavo, sed ĝi rezervas al si la rajton eventuale rifizi neŝatigajn artikolojn.

202. Pri la Insignoportado!

Ril. al 187.

Pri la efiko de insignoj oni jam multon parolis. En Nürnberg ĉeestis proksimume 4000 personoj, kiuj portis la kongresinsignon, kaj la efiko estis grandega: iage kaj notis preskaŭ ĉiunmome oni renkontis Esperantistojn en ĉiu parto de la urbo. Ĉiu vidanto devis konvinkiĝi pri ekzisto de Esperanto. Ĉar nuntempe en multaj grandurboj estas jam minimume 1000 Esperantistoj, en malgrandaj urboj kelkaj cent, laŭ la Nürnbergo ekzemplo, se ĉiuj Esperantistoj konstante portus la insignon, oni vidus ĉi — se ne en ĉiu minuto, sed almenaŭ en ĉiu duonhoro — Esperantistojn, kio estus konstanta, vivanta propagando, pli efika, ol multaj broŝuroj nelegataj, alioj: sepravfortaj, paroladoj ekloventaj. La Esperantistaro mem estas kulpa, se la mondo malmulton ŝcias pri ilia ekzisto. Inter la diversaj nun laŭmode portataj insignoj de sportaj kaj aliaj uniĝoj certe nia Esperanta stelo estas la plej ideala kaj inda homa signo, kiu honore disingas ĝian portanton de la aliaj homoj.

P. Balkanyi.

203. Pri korespondado.

Ne sen ia timeto mi estas skribonta kelkon da linioj pri korespondado. Mi ja konscias, ke verŝajne multaj Esperantistoj pli elokvente povus paroli pri ĉi tiu temo. Sed mi opinias, ke iafaje kelkaj eĉ nepotenciaj vortoj kapablas utili tiun aŭ tiun.

Ekzistas sendube inter la tutmonda samideanaro multaj, kiuj ŝatas pensinterŝanĝadon kun geamikoj pri aferoj ĉiufakaj. Tion pravas la granda aro da tiurilataj anoncoj kaj anoncoj en preskati ĉiuj naciaj kaj internaciaj Esperanto-jurnaloj. Ĉar la korespondado do ŝajnas esti amata inklinde ĉe grandparto de la Esperantistaro, oni povus facile konkludi, ke estas plej simpla afero, eltrovi la por si taŭgan korespondanton. Sed jen, nun ekkomenciĝas la malgrablaj kaj seniluziigoj. Ĝojplene oni ekskribas al trovita adreso esperante, ke baldaŭ regos vigla interŝanĝo de

pensoj, ideoj kaj opinioj. Sed ve! Post longa atendado finas aperas letero konsistanta el lingvomiksado, kiun oni unuavide opinias hotentotlingva. Sed kia miraklo! Jen enestas Esperanta vorto, jen alia. Ĉu gravas, ke ili malhavas la ĝustan finojn, necesajn supersignojn, ke ili estas plenaj je skriberoj? Tamen estas eroi el nia kara lingvo! Iom kun malpli grandigita ĝojo oni decidas komenci la deklaron de la hieroglifoj. Eble enhavo alvalora kaj interese kompensas la malĝustan por lingvaj malperfektaĵoj. Sed dufoje ve! La tuta letero estas nura krio je postmarkoj, helpemo ktp. Ĉu tian oni deziras, abomenante la kolekteman, kiu damaĝe okupas nun tiom da spiroj? Kaj la adreso promesas korespondadon pri ĉiuj belaj temoj.

Post ricevo de kelkaj tiaj skribaĵoj oni estas senkuraga. Kiel do riski la provon por plua fido, jam antaŭsciante, ke alvenos nur deziregoj pri kolektoobjektoj en lingva nedigestebla? Kaj supozite, ke oni respondas, samempie en maniero delikata atentigante pri la lingvaj "eraroj", kio sekvas? La sendito indignite vin titolas "logike-ulo"; li diros, ke ĉiamaniere oni forlignas la homojn de nia afero; ke li jam skribis ankaŭ aliflancon, tamen neniam ricevis tian malĝentilan respondon. Ien rekompenso al nia bona intenco. Oni ja nur volas helpi, progresigi la nefirmulon, esti bastono al la malfortulo sur la nekultivita lingva fundo.

Mi ne miras, ke inter la korespondantoj troviĝas tiel malmultaj Esperantistoj bone sciantaj la lingvon. La lertuloj ĝenerale estas korespondadon kun nekonektaj anoncoj. La kialo estas klara laŭ supra diritaĵo. Sed tio estas vere grava damaĝo. Tiel novaj lingvo-adeptoj aŭ neniam lernos skribi legindan letereton en Esperanto, have antaŭ la okuloj ĉiam nur saman muelojn, se ili estas antaŭeniraj kaj aspiras pliperktegi siajn lingvo-konojn, ili devas rezigni la valoran rimedon de reciproka instrua korespondado.

Mi finu. Sed unu demando mi ne povas preterlasi: Ĉu vi, samideano(in)o el kiu an laŭd karuĝas sendi leteron al karton skribitaĵon en via nacia lingvo al fremdulo, ĉe kiu vi intencas fari nepre bonan impreson, se via skribaĵo enhavos tiom da eraroj kiom da steloj sur la firmamento? Certe ne! Do, konkludu mem!

Jobo.

Bibliografio.

Recenzoj.

Deutsch-Esperanto Wörterbuch (German-Esperanto Vortaro) de P. Christaller. 2-a eldono. (Komp. Bibliografion ET 145.)

Germanoj posedas jam delonge plej bonajn lernolibrojn; sed malkas al ili ampleksaj bonaj vortaroj. La malnovaj mezgrandaj estis plejparte elĉerpitaj post la milito. Nun aperis nova German-Esperanto vortaro de Christaller certe kontentiganta la postulojn de la bezonoj. La valoro de la libro pligrandigas per tio, ke komence estas faritaj diversaj klarigoj kaj reguloj pri ordigo de vortoj, malkantaj vortoj kaj vortoderivado. En la vortaro mem oni trovas eksterordinare multajn esprimojn. Tio povus fariĝi danĝero; ĉar ekzistas tro multe da Esperantistoj kiuj senpripense kaj sendiference imitas kaj uzas ĉion, kion ili legas, ĉu tio estas oficiala aŭ neoficiala, ĉu ĝi nur estas proponita por iu speciala fako aŭ por ĝenerala uzo, ĉu ĝi eble estas nur nacilingva kulturo de la verkisto. Por forigi tiun ĉi danĝeron Christaller signis la oficialajn kaj la neoficialajn vortojn kaj nomis la aŭtorojn kiuj unue uzis tiun novan vorton aŭ ĵur kaj konatan vorton en nova senco. Ankaŭ vortoj nerekomendindaj aŭ superflujaj por komuna lingvo havas specialan signon. Do enute. La vortaro estas tre valora en la manoj de ĉiu pensanta Esperantisto, por kiu ne ĉio legita estas dogmo. Por ne pensanta Esperantisto ne taŭgas vortaro de 10-oblak amplekso kun nur oficialaj vortoj. Tre bonaj estas la aldonaĵoj "simpligoj", kies listo estas farita konsekvence al nomitaj fundamentoj aŭ oficialaj vortoj; sed la propono de sufluko -io por fako, teritorio pli bone ne estus farita en vortaro. Tiajn temojn oni priluktas nur en specialaj prilungvaj verkoj. Ne plaĉas al mi en multaj partoj la aldonaĵoj lasta ĉapitro pri la oficialaj laŭ § 15 de la fundamento, estas tro dogma. Unue: Kio ekzistas en la latina lingvo, offe sed ne ĉiam estas internacia. Latina estis kaj estas ankoraŭ internacia lingvo por scienculoj kaj multaj latinaj esprimoj penetris el la scienco en la komunan lingvon. Due: Eĉ se la latina finigo -ia estus internacia, al ĝi respondus nur Esperanta -jo (kiun cetere Chr. mem jam proponis). Inter la proponitaj vortoj estas multaj kiujn certe multaj ne aprobas aŭ ne aprobas en la montra formo. Multaj ankaŭ taŭgas nur por specialaj celoj. Ekz. ĉehstejno? (ĉu stejno = ŝtono?) dengli (akrigi), Erzgebirge (Z), kikeriki, nabobo, pifaz- (li) kip. Aliaj inter la novaj vortoj fakte apartenas nur al unu el la grandaj eŭropaj lingvoj, kaj aliaj akceptis lin kiel fremdvortojn, ekz. bersaliero estas nur itala (ne germana). Bona estas la konsilo uzi en Esperanto la titolojn en ilia originala formo kun aldono de klarigo kaj elparolo. La donita ekzemplo Reichsgericht ne estas ĝusta; ĉar la germana elparolo estas Rajhsgeriht (ne Reijhsgeriht). Tamen tiu neaprobato ne malgrandigu la taŭgecon de la vortaro. Kaj la germanaj Esperantistoj ĝoju pri baldaŭ aperonta Esperanta-Germana vortaro de nia eminenta kaj aktiva akademiisto.

H. Hurler.

Korektoj de la eraraj tradukoj en "Universala Vortaro" (kun aprobo de la Lingva Komitato). Rusa parto — pola parto. Eldonejo kiel supre. Prezo 0.50 sv. frk.

Tiuj du kajaĵoj — litografitaj eldonoj — estas necesaj suplementoj al la vortaroj pola kaj rusa. La nomoj de la verkintoj S. Obruczev (rusa) kaj K. Bein (pola) garantias pri fidindeco de la korektoj. La kajaĵoj, sufiĉe malfrue publikigitaj, estas tre modestaj komencoj de laboro, kiun el la Lingva Komitato devus fari ankaŭ rilate al alia vortaro. Estus dezirinde, ke fine ĝi okupus sin pri kompilo de komparaj difinicoj esperanto-esperantaj kaj nacilingvaj, por forigi la haŭson ofte regantan en tiaj vortaroj. Sen tio la prilaboro de fakvortaroj estas grave malhelpata, se eĉ ne malebla.

A. Křiv.

El la mitologio de antikvaj popoloj. De K. Brüggemann. Universala Biblioteko n-o 5, 80 pg. 10½: 16 cm. 1923. Esperanto-Verlag Friedrich Ader, Dresden A 27. Prezo: 0.70 gmk. X ŝlosilnombro, por bonvalutaj landoj 0.70 sv. frk. Mi ĉiam ĝojas, kiam mi povas anonci la aperon de nova verketo el la plumo de nia bonkonata stilisto Brüggemann. Li ĉerpas el ĉiuj fontoj kaj boninsinkite trovas nur la plej bonajn gutojn por ni. — La kvina volumo de la l. l. enhavas mitojn, herorakontojn kaj legendojn el la greka, persa, romana, babilona-asira kaj germana mitologio. Tiu, kiu ankoraŭ memorigas laŭ la mitojn scindajn en bonega lingvo. — Mi efektive admiras la diligentecon kaj laboron de samideano B., kiu laŭsajne vivas kaj laboras nur por Esperanto.

G. Ajul.

Joseph Rhodes kaj la fruaj tagoj de Esperanto en Anglujo. Eldon. Esperanto Federacio de Yorkshire. 12½x18,5 cm, 140 pg., forlitke broŝ. aŭ tole bind. Prezo 2/10 resp. 5/0 s. afrankite, acetabla de B. E. A., 17, Hari Street, London W. C. 1.

Tre leginda libro ĉefe priluktanta la Esperantistan vivon de nia morinta fervora angla kunbatalanto kaj konata vortaristo. Enhavas krom tio tre rimarkindajn notojn pri la Esp. movado en Anglujo de la fruaj tagoj ĝis nun kaj montras la progresantan evoluon de nia movado en tiu lando.

La lingvo en la 20 ĉapitroj ampleksanta libro estas tre klara. Preserarojn ni apenaŭ vidos. La aranĝo de la libro, preso kaj ekstarajo estas modelaj, la verko entute rekomendinda al ĉiuj, povantaj mendi nun laŭ angla valuto.

R. Kr.

Le traducteur de Poste internationale (La internacia poŝta tradukisto) de S. Gaertwagen, Supra poŝtoficisto, Kraków, 4a eldono.

La libro estas interpretilo por la plej uzataj poŝtaj fakesprimoj en la poŝta kaj telegrafa trafiko. En 10 tabeloj ĝi prezentas la materialon, kiun la fakano bezonas. Kvankam la oficiala lingvo de Universala Poŝta Unio estas la franca, la praktikoj montras la neeblecon, ke ĉiu poŝtisto uzu tiun idiomon en la servo. Konsiderante tiun ĉi fakon, la aŭtoro kompilis la materialon plurlingva en germana, ĉeĥa, angla, franca, itala, pola, rumana, sveda, hungara lingvoj kaj, kio nin plej interesas, en Esperanto. La lasta parto enhavas tabelon pri la numeraloj diverslingvaj, klarigoj pri la cirila alfabeto kaj modelojn de adresotradukoj. La Esperanto-parton verkis konata samideano Behrendt. De la lingva vidpunkto ĝi estas tre bona. Bedaŭrinde, nur estas, ke la evidente reviziita eldono enhavas la ripetigan eraron, ke anstataŭ "ke ofte estas presita", "c" en "enscribo, afranco, loco, neconata" ktp. Forigo en nova eldono pigrandigos la valoron de la verkaĵo, kiun mi povas rekomendi ne sole al fakanoj, sed al ĉiuj, kiuj devas okupi sin pri internaciaj poŝt-sendajoj. La prezo de la libro estas 6 sv. frk. Ĝi estas havebla per la aŭtoro ĉi-supre menciita.

R. Kr.

Esperanto Biblioteko Internacia. N-oj 29—31 "Sub la Negro" (trad. de Kuro) fund. prezo 0.90 X ŝlosilnombro, eksterlande 0.90 sv. frk. Esperanto Biblioteko Internacia No. 32 "La Amkonkuranto" (traktita komedio originala de Reinhold Schmidt), Eldonis: Ellersiek & Borel, Berlin S. W. Wilmsstrasse 5.

La malgrandaj kajaĵoj de tiu konata kolekto apenaŭ bezonas specialan rekomendon. Jam antaŭ la milito ili estis deziritaj legajoj. Ankaŭ la novajn kajaĵojn oni devas nepre rekomendi al la literatur-amantoj. Enhavo tre interesa. Preso, ankaŭ rilate al preseraroj, aranĝo kaj ekstarajo estas same modelaj, kiel aliaj eldonaĵoj de tiu entrepreno.

R. Kr.

Nova (5-a) eldono de
**"BES-Adresaro
de
Esperantistoj"**

Ius aperis — La bone jam konata Jarlibro de "BES" enhavas denove tre interesan adresaron de Esperantistoj el ĉiuj landoj, portretojn, registrojn de personoj kaj E-entreprenoj, listojn de lokoj, kiujn oni proponas komercale, ekz. rebuson, kun 15 premioj en la valoro de 40 frankoj svisaj. — Krom tio ĉi 10-a kaj 10-a mendito ricevos premie esperantistojn por 1 kaj 5 fr. sv. — PREZO 1 fr. sv. — Por Germanujo kaj aliaj malbonvalutaj landoj speciala rabato. — Mendi tiu aŭ postula almenaŭ senpage prospekton ĉe Bohema Esperanto - Servo - Praha II, Zlín 44, Ĉeĥoslovakio.

Fervendistoj! Ferfabrikejoj!

Kiu bezonas litojn kaj maŝinojn por la prilaborado de metaloj?
Malmultekoste kaj bone!
Bonvolu peti informojn de
Walter Freygang, Weinböhla i. Sa.

Fumu
La Esperanto-Cigaredojn
"Tutmonda Esperanto"
"La verda stelo".
Cigaredomanufakturo Antehmo, Zittau (Saks.)

Baldaŭ aperos
Eŭropo ĉe la abismo
de
Francesco Nitti
lama ministrara prezidanto itala
Esperanto-traduko
kun speciala antaŭparolo de la eminenta aŭtoro.

Petu prospektajn kaj detalajn kaj sendu antaŭmendojn je favorezo al
**Frankf. Societäts-Druckerei G.m.b.H.,
Abteilung Buchverlag, Frankfurt a. M.**
Korespondon en Esperanto. - Ilustr. kartoj rifuzataj.

Anoncoj.

EDZIGOJ KAJ FIANCIGOJ. F-ino M. Katzemich (Vendreda Klubo en Köln) edziĝis kun s-o Hugo Gernsbacher el Köln, Metzstr. 1. — S-o M. Schmeller (Vendreda Klubo en Köln) edziĝis kun f-ino H. Esser, Metzstr. 5. — S-o H. Thelen (Vendreda Klubo en Köln) Marsiliustr. 48, fianĝiĝis kun f-ino Else Flurin el Basel.

[1]

UNUARANGAIN VINOJ de Rejno kaj Moselo, ankaŭ ŝaŭmajn vinojn vi aktaas profitige ĉe: Altenkirch, Ecardi Nach, Mainz, Reprezentanto: Peter Becker, del. de U. E. A. en Mainz (Germ.) Augustinerstr. 58.

[2]

ANGLA MONO PAGOTA (GRANDA SUMO) por ekzemplero de "OSTRONIERA" TESTAMENTOJ EN RUSA LINGVO. La Vostokov au faksimilo. Skribu al HIRST, 19 Lion Chambers, Huddersfield, Anglujo.

[5]

Korespondon kaj Interŝango.

S-o Sim. Mkritiĉan en Tiflis informas siajn amikojn, ke li en lasta oktobro erare estis arestita kaj malliberigita. Post liberigo li nun baldaŭ povos reskribi al ĉiuj siaj amikoj kaj sendas al ili plej bonajn salutojn.

[1]

S-o Stasyas Ozelis—Kaukazus, en Rokiŝkis, Viejoj Aikŝte 27 (Lit.) deziras korespondi kun gesamideanoj el ĉiuj landoj pri nacia popolpoezio, kantoj (melodio), teksto en nacia lingvo kaj laŭvorta traduko en Esperanto, dancoj, kutimoj ktp. Interŝangas il. pk. Filatelista afranko deziri.

Interŝango de gvidlibroj. La Esperantista klubo en Praha I, Prikop 1, Edison, fondis kolekton de Esp-aj gvidlibroj. Tutmondaj samideanoj estas petataj, ke ili alsendu Esp-an gvidlibron de sia urbo al lando (1—2 ekz.). Rekomence ricevos ĉiu sendinto 20 paĝan luksan rĉe ilustritan Esp. gvidlibron tra Praha, antaŭ la milito eldonita. Laŭ la valoro de la sendaĵo ankaŭ pluraj ekzempleroj estas sendataj.

[1]

Fr. Völker & Co., Mainz a. Rh. rekomendas sin je liverado de materialoj por elektra instalado. Bonvolu skribi al: Reprezentanto P. Becker, Delegito de U. E. A., Mainz a/Rh., Augustinerstr. 58.

[1]

Samideanoj, por mono el alvalutaj landoj, sendita en enskr. letero mi sendas ĉiujn aperintajn kaj aperontajn germ. postmarkojn. S-o W. Wittbrodt, Neukölln, Anzen-gruberstr. 3 (Germania).

[1]

S-o R. Estko, Wilno, str. Ad. Mickiewicz 24—9 (Polujo) Interŝangas polajn kaj rusajn car-markojn, nedifektajn kontraŭ alilandaj.

[1]

Fraŭlo Erich Ruder, 19 Jara, Chemnitz, (Germ.), Lützowstr. 55, deziras interŝangi il. pk. k. ĉ. l.

[1]

Fraŭlo Roberto Rosner, 21 Jara, Chemnitz, (Germ.), Lützowstrasse 27, deziras interŝangi il. pk. k. ĉ. l.

[1]

S-o Leo Romppainen, Mikkeli Sanomat, Mikkeli (Finlando), deziras interŝangi pm. nur kun veraj f-istoj.

[1]

F-ino Mario Schulz, 25 Jara, Budapest (Hungarujo), 6, Fothi ut. 25-128, deziras interŝangi il. pk. k. ĉ. l.

[1]

S-o Johann Wölshlager en Grossgmein (Salzburg-Aŭstrio) deziras korespondadi per p. i. kaj l. kaj interŝangi pm. k. ĉ. l.

[1]

F-ino Manjo Bastlova, Sl. Ostrava 955 (Ĉeĥoslovakio) deziras interŝangi pk. bildf. afrank. kun ĉiuj landoj.

[2]

Car mi ricevis tiel multajn respondojn je mia anonco, mi ne povas respondi al ĉiuj. Pardonu min. Sigrid Carlen, Yxhult, Kumla (Svedujo).

[1]

S-o M. Stein, Miedzyszec-Podlaski, Szkolna str. 16, (Polujo) deziras interŝangi pm. kun ĉiuj landoj (escepte Germanujo), donas Polujon, Danzigon, Palestinan kaj Sovet-Rusujon.

[1]

Interŝango de postmarkoj pogrando (5-20 pecoj de unu speco) ankaŭ sur folioj kun ĉiuj landoj. Fuŝsendaĵoj malakceptataj. Bazo Yver, Senf ktp. S-o Jan Basli, Sl. Ostrava 955, Ĉeĥoslovakio.

[2]

S-o Edgardo van Gysegem, Chaussée de Grammont 91, Erembodegem (apud Alost) Belgujo, instruisto-stud. deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj (bfl.), papermono, kaj leteroj k. ĉ. l. (ankaŭ kun junaj fraŭlinoj).

[1]

S-o Jozef Pékny, en Kraków, Podgorz (Pol.) deziras korespondi per il. pk. kun samideanoj de la tuta mondo krom Aŭstrio.

[1]

S-o Jakob Trzcinski en Białystok, Piękna 7, (Pol.) deziras korespondi per il. pk. kaj let. kun gesamideanoj de la tuta mondo, interŝangas ankaŭ papermonon.

[1]

Mi deziras interŝangi il. pk., pm. kaj papermonon kun kolektoj de la tuta mondo. S-o A. Wysocki, Rabska 14, en Białystok (Pol.).

[1]

Oficisto de Berlin'a Esperanto-eldonejo deziras korespond. kun gesamideanoj el ĉiuj landoj. Mi interŝangas pm. il. pk. kaj let. Max Gensen, en Berlin-Wilmersdorf, Pelmoldersstr. 55.

[1]

S-ino Grasilda Vidutene, Rokiŝkis (Litovujo) sendos 50 diversajn litovajn pm. kontraŭ nova franca, angla aŭ germana virinmodjurnalo.

[1]

Mi deziras korespondi kun gesamideanoj de la tuta mondo per pk. kaj let. Rob. Wachtel, Schützenstr. 87, en Homberg a/Rh. (Germ.).

[1]

Japana laboristo, 25-jara, deziras interŝangi vidajkartojn (bfl.) kaj leterojn kun seriozaj gekorespondantoj el ĉiuj landoj. K-do Eizo Saito, ĉe s-o Motoda, Abranokoj-Kujo, Kioto, (Japano).

[1]

180 fervoregaj novuloj de fondita grupo deziras interŝangi il. pk., pm. ktp. kun ĉiuj landoj de la tuta mondo. Adreso: Grupeŝtro Leo Fiedler, Schillerstr. 15, III, en Breslau 15 (Germ.).

[2]

Mi korespondas kun la tuta mondo per il. pk. (naturnidajloj), interŝangas pm. kaj papermonon. Adreso: s-o Sina. Dzius, en Kielce (Pol.) Siaro-Zagnanska 35. m. l.

[2]

Pograndaj komercistoj — fabrikantoj Ofertoj dezirataj. H. Sjöding, vendisto de paperajoj kaj muzikaĵoj. Malm skilnadsgatan 54, Stockholm.

[1]

Filatelistoj! Por 2 sv. fr. aŭ egala valoro mi sendas 50 div. maloftajn poŝtkartojn de la liberŝtato Danzig. Interŝangas pm. Oskar Köhler, Ölsnitz i. Vgl., Bergstr. 3, [18]

[18]

Esperanta grupo deziras korespondi kun gesamideanoj de la tuta mondo. Skribu al s-o Paulo Renner, en Ober Wüstgiersdorf i. Schl. 48 (Germ.).

[1]

Juna fraŭlino, poŝtoficistino, deziras korespondi poŝtkarte kun inteligentaj samideanoj de la tuta mondo. F-ino Karin Rosin en Söderhamm, Sved.

[1]

Poŝtkartojn el oriento landoj vi plej malkare aktaas ĉe Eldonejo "Esperantista Voĉo", en Jaslo (Pollando). Ni sendas pm.-elektojn kontraŭ bonaj referencoj aŭ mon depono. Interŝangas pogrando; fuŝsendaĵoj malekceptataj.

[2]

Mi deziras korespondon kun seriozaj kaj idealaj fraŭlinoj, inter 18—20 jaroj, de la tuta mondo, per let. kaj il. pk. pri interesaj kaj sciencaj temoj, Esperanto aŭ angl. Robert Pandikow, Peilbott III, Wilhelmshaven (Germ.).

[1]